


KATALUNA ESPERANTISTO




OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO - ASOCIO
numero 268 (35) - kvina epoko - junio 1990




DEBATO PRI EŬROPO
(informon legu sur paĝo 19a)



AJUNTAMENT  DE PALAMÓS

invitas vin omaĝi
Frederic Pujulà i Vallès
(programo sur paĝo 21a)



NIA AGADO

BARCELONA

La loka Grupo Firma Tero elstaras en la lastaj monatoj per okazigo de ĉiumonata aranĝo, la unuan sabaton je la 6a h. vespere. Ni gratulas la tieajn grupgvidantojn pro ilia iniciato kaj espereble ilia ... "Nia amika rondo" bone enradikiĝos.

PERPINYÀ

Kun ĝojo ni informiĝas ke en nia nordkataluna ĉefurbo oni starigis "Asociació Amics de l'Esperanto" (Asocion Amikoj de Esperanto) kiu celas la disvastigon de nia lingvo per la kataluna. Ili sukcesis elsendi tra la katalunlingva radiostacio "Radio Arrels"

Nia Asocio varme gratulas ilin kaj pretas kunlabori kun la juna asocio. Se ĝia fondiĝo fontis el la entuziasmo kiun instigis nia 24a Kongreso okazinta tie, ni estos ege feliĉaj.

SLOVAKA LITERATURO EN ESPERANTO

Ni danke kvitancas la 300-paĝan libron kiun sendis al nia Asocio la Unuiĝo de Slovakaj Verkistoj.

Temas pri antologio-kies kompletecon ni ne povas taksi-kui celas diskonigi la slovakajn literaturon en la mondo.

La plej granda parto de la libro estas verkita per la angla lingvo, sed tamen 43-paĝa parto en Esperanto pruvas ke oni serioze agnoskis la valoron de nia lingvo en internaciaj rilatoj. Jen Esperanto en la praktiko, vere sekunda ekzemplo. Ni gratulas niajn slovakajn gesamideanojn.

INTERFEROJ DE LA KATALUNA EN ESPERANTON KIEL FONTO DE ERAROJ

Jen interesa studaĵo de nia estimata aktivulo Hektor Alòs, kiun ni ĵus ricevis, publikigota en nia venonta revuo. En la februara numero ĉi-jara de nia revuo ni aperigis artikolon de la sama aŭtoro pri la fonetikaj interferoj.

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO/ KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

(Enregistrata de la "Generalitat de Catalunya" en la unua Sekcio per n-ro 5785)
Apartat / Poŝtkesto, 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio. Telefonnumero (93) 716.3633 (ekde lundo ĝis vendredo inter 20a kaj 22a h.) Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

KOTIZOJ POR LA JARO 1990: Individua Abonanta Membro 1600 p-toj; Individua Subtenanta Membro 3200 p-toj; Individua Dumviva Membro 32000 p-toj; Kolektiva Membro 3200 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - Agència 461 - Sabadell kontonumero 550 - 53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Jordi Carbonell i Pinyol; Vicprezidanto: Maria Garcés i Coll; Ĝenerala Sekretario: Llibert Puig i Gandia; Kasisto: Oscar Puig i Cánovas; Komitatanoj: Carles Berga, Bartomeu Costa, Josep Franquesa, Joan R. Guiñón; Ĝirona Espero, Daniel Rubió, Josep M. Serrano.

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Lluís Armadans, Ricard Jordana.

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:

Gabriel Mora i Arana (prezidanto), Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (Florluda Majstro), Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (Florluda Majstro), Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip, Giorgio Silfer (Florluda Majstro), Joan Ramon Guiñón i Roset (sekretario)

FLORLUDAJ MAJSTROJ: Clarence BICKNELL (3aj IFL, Olot 1913), Artur DOMÉNECH i MAS (6aj IFL, Reus 1916), Marian SOLÀ i MONTERRAT (6aj IFL, Reus 1916), Josep VENTURA i FREIXAS (8aj IFL, Girona 1921), Jaume GRAU i CASAS (9aj IFL, Manresa 1923), Bernard GOLDEN (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980), Giorgio SILFER (24aj IFL, Olot 1984), Timothy BRIAN CARR (28aj IFL, Barcelona 1988)

PEDAGOGIA KOMISIONO: Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Josep Tordera, Manel Marqués.

VORTARA KOMISIONO: Jordi Carbonell i Pinyol - Avda. del Paral·lel, 96-6è - Tel. 329.2481 - 241.9411, 08015 Barcelona.

KOLEKTIVAJ MEMBROJ: Centre d'Esperanto Sabadell, Apartat, 407, Papa Pius XI, 130-tl. (93) 716.3633, 08200 Sabadell; Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto Grupo, St. Gervasi, 45, 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Centre Excursionista Pulgcastellar/Esperanto - Grupo, St. Josep, 20-08922 Sta. Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club d'Amics de la Unesco de Catalunya/Departament d'Esperanto, Mallorca, 207 - pral. tel. (93) 253.9507, 08036 Barcelona; Esperanto - Centro Tarragona, Apartat 1236- 43080 Tarragona; Esperanto-Fako "S.C. Joventut Terrassenca", St. Francesc, 52-08221 Terrassa; Esperanto Grupo "Jozefo Anglès", Apartat, 336-08190 Sant Cugat del Vallès; Firma Tero Esperanto - Fako Centre Comarcal Lleidatà, Gran Via, 592 08007 Barcelona; Grup Esperantista Sant Pau d'Ordal, Dr. Zamenhof, 12 tel. 899.3003 - 08739 Sant Pau d'Ordal; Ĝirona Espero, Apartat, 509 -17080 Girona, Hispana Esperanto - Fervojista Asocio ĉe Stacidomo Sants - Barcelona; Secció d'Esperanto Centre d'Estudis Comarcals d'Igualada, Baixada de Sant Nicolau, 21 08700 Igualada. Dipòsit Legal: B- 27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. 725.5091 Sabadell.

KOMARKAJ DELEGITOJ

Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i Roig
St. Magí 20 - 3r. tel. (93) 893. 7176 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf)

Garrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda. Escola Llar. Ctra. de la Canya, s/n. tel. (972) 263829 - 17800 OLOT (Garrotxa)

Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La Selva: Ĝirona Espero, Apartat, 509 - 17080 Girona (Gironès)

Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp: Josep Ma. Serrano, Edifici Europa B-2-1 (St. Pere i St. Pau) tel. (977) 218941 - 43007 Tarragona (Tarragonès)

Baix Ebre, Montsià: Josep Ma. Altadill - Berenguer IV, 23 tel. (973) 442009 - 43500 Tortosa (Baix Ebre)

Illes Balears: Xavier Margais i Basi, Orient, 60 - tel. (971) 613830 07110 Bunyola (Mallorca)

Catalunya Nord: Joan Fernández, 21 rue Henri Matisse - F 66000 Perpinyà (Rosselló)

PROGRAMO 7a INTERGRUPA RENKONTIĜO

SABATON, 7an de julio 1990

16a h. Akceptado de ĉeestantoj en la sidejo de Centro de Esperanto Sabadell, str/Papa Pius XI, 130.

vizito al la monumento, gvide de loka aktivulo.

malfermiĝo de la libroservo kaj la trinkejo.


17a h. intergrupa kunsido kun jenaj ĉefaj temoj:

- Esperanto en la praktikon (ekzemploj kaj projektoj)

- Intergrupa interŝanĝo kaj kunlaborado (vizitoj, dokumentoj, spertoj)

- p a ŭ z o -

20a h. informkunveno pri IKEL (Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj) (disdono de informiloj kaj vendo de tiutemaj revuoj).



ATENTIGO

La gastiganta Grupo donacos al ĉiuj ĉeestontaj Grupoj, fotokopion de ĵus malkovrita dokumento: temas pri originala skribaĵo de D-ro Zamenhof datita la 29an de junio 1912 kaj adresita al la Sabadella Urbestraro.



peston.

DIMANĈON, 8an de julio 1990

12a h. ĉe "Casal Pere Quart" Rambla, 67-71.

Publika debato pri la temo "La lingva problemo en la estonta Eŭropa Unuiĝo" kun partopreno de 4 referantoj, specialistoj pri la temo.

14'30 h. Komuna tagmanĝo ĉe Restoracio Urpi, Avenuo 11 de setembre, 38 kun tre kvalita menuo: prezo 1.800 p-toj. (bonvolu plej rapide mendi vian lokon)

TRANOKTADO

Al tiuj eksterlokaj junaj gesamideanoj kiuj deziras tranokti sabate ni disponigos al ili senpagan lokon.

Ankaŭ kelkajn fruanoncintajn plenaĝulojn eblos gastigi ĉe samideanaj hejmoj. Ceteraj povos tranokti ĉe la loka Hotelo Urpi, kie individua ĉambro kun matenmanĝo kostas 3.250 p-tojn kaj duobla 6.500 p-t.

Pliinformiĝu ĉe la organiza Grupo ĉiutage inter 20a kaj 22a h. je la tel. 716.3633.

(daŭrigas sur paĝo 21a)

Scienca aplikado:

Tria pola sesio lanĉas AIS-filion en Bjalistoko

En novembro 1989, seppersona delegacio el Bjalistoko, gvidata de la urbestro Jerzy Csaban kaj la rektoro de la politekniko prof. Kazimierz Pieńkowski, subskribis en Berlino kontraktojn kun Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino. Unu el tiuj kontraktoj koncernis la konstruon de "Akademia Domo" en Bjalistoko, kiel parto de la projekto por Esperanto-Centro Zamenhof. Alia fiksas la bazon por scienca kunlaboro inter la politekniko kaj AIS.

La unua konkretigo de tiu kunlaboro estis "tria pola AIS-sesio", kiu okazis en Bjalistoko inter la 17-a kaj 25-a de februaro 1990. Partoprenis 60 personoj, ĉefe el FR Germanio, Italio, Pollando kaj Sovetunio, sed ankaŭ el Aŭstrio, Brazilo, Ĉinio, Jugoslavio kaj Svislando. Ĉio okazis en tre bone ekipitaj, oportunaj konstruaĵoj de la Politekniko; iom da administra kaoso devenis de la misproporcio inter la priservantoj kaj la priservatoj.

La semajna programo proponis densegajn okupojn kun elekteleco, kion oni ŝanĝis laŭ la petoj de la plej sciavida aŭskultantaro por ebligi partoprenon en ĉio. La kursfinaj ekzamenetoj tamen konfirmis, ke ne al ĉiuj sufiĉis forto por tio. Okazis ankaŭ




Akademia Forumo pri Ekologio (la ĉeftemaro de la sesio), dum kiu oni formulis sciencajn revojn apud agadprogramo, kiu fariĝis AIS-dokumento. Dum solena kunsido de du senatoj, la ministro pri nacia edukado, prof. Grzelak, esprimis la volon kunlabori por evoluigi la interbranĉan kaj internacian aktivadon de sciencistoj pere de Esperanto.

La plejparto de la aŭskultantaro celis kolekti pereksamene la regularajn studunuojn, kiuj rajtigas finĉkameniĝi post kelkjara sesi-partoprenado (en diversaj landoj). Per adapta adopto magistriĝis A. Bernatowicz, E. Gorzka, D. Tyblewska-Kundzicz kaj doktoriĝis A. Brozi (onidire plej impone) kaj Z.

Galor – ĉiuj el Pollando. Originalan doktordisertacion pri lingvistika kibernetiko prezentis Qiao Yi el Ĉinio.

En la kultura programo oni spektis *La eta princo* en interpreto de B. Łukaszewska, aŭskultis kortuŝan koncerton de Jerzy Handzlik, kunkantante liajn kanzonojn, regaliĝis per poemoj de L. Lięża kaj la muziko de ĉambra kvarteto. Akcepto de la urbestro kaj dancvespero kompletigis la distran flankon de semajno da pena kaj inspira laboro.

laŭ raporto de T. Tyblewski (Pollando)



Supre, dekstre: Prof. Helmar Frank (maldekstre) kaj rektoro Kazimierz Pieńkowski manpreme sigelas sian kunlaboron. Malsupre: Ampleksa publiko ĝuis la prelegojn kaj eltenis la ekzamenojn.

Septembru science kun AIS!

1-10 septembro 1990,
San Marino:

Sepa Sanmarina Universitata Sesio
(SUS 7)

12-14 septembro 1990,
Poprad, Ĉeĥoslovakio:
INTERKIBERNETIK '90,
kun kursoj de AIS

14-25 septembro 1990,
Bjalistoko, Pollando:
Oka Sanmarina Universitata Sesio
(SUS 8)

Informoj, aliĝiloj, regularo
haveblas ĉe la adreso:
Prezidanta Sekretariejo de AIS
Kleinenberger Weg 16 B
D-4790 Paderborn,
FR Germanio



30 aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



OMAĜO FREDERIC PUJULÀ I VALLÈS

PROGRAMO

DIMANĈON, 30an de septembro 1990

11a h. Akceptado en la Urbodomo, str. Major, 56 kaj inaŭguro de ekspozicio.

11,30. ĉe la Kulturdomo de "La Caixa" str. Santa Marta, 1-3
Inaŭguro de la 30aj Internaciaj Floraj Ludoj -paŭzo- kaj omaĝo al nia kataluna pioniro Frederic Pujulà i Vallès.

14,30. Komuna tagmanĝo ĉe la restoracio de Hotelo Marina, Avenuo 11 de septembro, 48. Menuo: almanĝaĵoj diversaj, speciala "paella" kun viando kaj fiŝaĵoj, kalmaretoj platkuiritaj, pano, akvo, vino kaj kafo. Prezo 1.500 p-toj. (mendu tuj vian lokon kun samtempa pago rekte al nia Asocio, ĉu poŝtgire aŭ per bankmandato kreditebla en nian konton 550-53 ĉe "Caixa de Pensions" Agència 461-Sabadell.

17a h. Tuj post la tagmanĝo kaj en la sama restoracio okazos la ĉiujara Asembleo (kunvokilon vi ricekun la venonta revuo)



ĈEESTU LA INFORMKUNVENON DE IKEL, SABATON 7an DE JULIO JE LA 20a H. VESPERE.

PRI LA RILATOJ INTER LA LINGVOJ DE ETNAJ MINORITATOJ KAJ LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

La plej multaj uzantoj de la Internacia Lingvo supozeble profunde dubas ĉu vere ekzistas, ĉu fakte povas ekzisti atentindaj rilatoj inter Esperanto kaj la lingvoj de tiu bunta fasko de etnaj minoritatoj abundaj en ĉiuj kontinentoj. (Evidente, ĉi tie tute ne temas pri lingvistikaj, sed nur pri lingvopolitikaj rilatoj.) Ĉu Esperanto ne estas la savilo el la kaoso de lingva diverseco? Ĉu valoras ankoraŭ okupiĝi pri tiuj minoritataj lingvoj, en multaj kazoj parolataj nur de po kelkcento da homoj, kiam la mondo strebas al unueco? Ĉu la Internacia Lingvo ne havas multe pli vastan horizonton ol la frisa, kataluna, bretona, kimra ktp.? — Tiaj opinioj ekzistas, eĉ abundas, kaj ne estas surprize renkonti ilin speciale ofte inter la plej fervoraj adeptoj de Esperanto. La protagonistoj de instruado de la Internacia Lingvo en publikaj lernejoj tra la tuta mondo facile vidas konkurencon en la minoritatestoj kiuj postulas ke oni instruu la infanojn pri kaj en la piemonta, eŭskera, okcitana, gaela, lapona ktp. Ordinara esperantisto komprenas ke — almenaŭ dum pluekzistas la nuna ŝtatoj — necesas lerni la rusan, francan, anglan aŭ kastilian, kiom ajn li insistas pri la bezono por vere internacia komunikilo. Kaj tiu esperantisto konsideras la instruadon de sia ŝtata lingvo memkomprenebla. Sed kial ŝargi la infanajn cerbojn per iu regiona lingvo?

Esperanto egalrangigis

Ŝtata E-diplomo

La legantoj de Budapeŝta Informilo jam sciigis pri la renaskiĝo de la E-instruado en nia atlemejo. Nuntempe nia havas tiel gravan bonan novaĵon, ke ni ne povas ne informi la publikon pri ĝi. Ni esperas, ke nia ekzemplo estos sekvata ankaŭ en aliaj samtipaj lernejoj.

Post la reformo de la lingvoinstruado, kiam la rusa ne plu estas deviga fremda lingvo, proponiĝis eluzenda eblo por ni, esperantistoj. En la unua „libera” studjaro 28 gestudentoj elektis E-on kiel unuan fremdan lingvon, poste dum la semestro aliĝis 5 pliaj „rifugiintoj” el la rusaj kaj germanaj grupoj. Tiel oficiale okupiĝas pri la Internacia Lingvo entute 33 novbaktaj kaj 6 maljunaj esperantistoj. La unuakursanoj devas trapasi lingvoekzamenon, ĉar sen ĝi ili ne ricevos diplomon post la kvara jaro. *Tiel egalrangigis Esperanto kun la aliaj grandaj lingvoj en nia atlemejo.* La studentaro kaj la kolegaro paŝo post paŝo alkutimiĝis al E-o. Pri niaj programoj, pri niaj rezultoj kaj agado raportis la Institutaj gazetoj. Post dujara konscia preparo mi kuraĝis proponi al la estraro la enkondukon de E-o en nia atlemejo. Estis bezonata samtempeco de multaj faktoroj por la venko, tamen ni sukcesis.

Jam ekzistas oficiala rezolucio pri tio, ke *ekde septembro de la kuranta jaro oni enkondukos E-on kiel C-fakon* ĉe ni. Tio signifas, ke la studentaro en la tria studjaro rajtas elekti E-on kiel trian fakon aŭ

ŝanĝi lun fakon originalan je E-o. Post la 5-semestra studo oni ekzameniĝas pri la studobjektoj kaj ricevas ŝtatan instruistan diplomon pri E-o.

La estraro de la atlemejo volonte helpas ankaŭ al la instruistoj de la rusa lingvo kaj ebligas korespondan kurson por ili, se troviĝos sufiĉe da interesiĝantoj.

Mi dankas la helpon de ĉiuj, kiuj per subtenaj leteroj, bonvolaj konsiloj kaj promesitaj librodonacoj helpis la antaŭeniron de la aferoj, nome dankegon al s-ino BARCSAY Zsuzsa, instruistinoj de ELTE: KOUTNY Ilona kaj VARGA-HASZONITS Zsuzsa, kaj al PRINCZ Oszkár. Mi dankemas al s-ro Tazio CARLEVARO, kiu en aprilo kun tri studentoj vizitis nian atlemejon kaj ankaŭ per tio altigos nian reputacion.

La tasko estas donita, la respondeco grandegas.

Karaj Kolegoj! Sekvu nian ekzemplon, ne senesperigu post la unuaj rifuzoj, ĉar veras la kantoteksto: „se falante: restarante — tiel ni venkos”!

SMIDÉLIUSZ Katalln,
Pedagogia Atlemejo, Szombathely

Redakcia noto: Pro la certeco, ke multaj niaj legantoj deziras gratuli al la elstarega rezulto, ni publikigas la plenan adreson: Berzsényi Dániel Tanárképző Főiskola, Szombathely, Pf.: 170. H-9701; tel.: 13-892. (El Budapeŝta Informilo 6/90)

HEROLDO

Fondinto: Teo Jung — Eldonejo, redaktejo, administrejo: Heroldo de Esperanto, Ada Fighiera-Sikorska, Via N. S. Andre 15, I-10078 Venaria Reale (TO), Italio — Poŝtkontoj: Bruselo 000-0078887-26 — Köln 194943-504 — Torino 23952104 "Sikorska-Fighiera Heroldo" — Bankoj: Banco di Roma, Torino, konto 32108. A. Sikorska — "Heroldo" — Periodico quindicinale — Reg. al n. 1 del 3 feb. 82, Trib. di Pisa Edistudio, via G. Bruno 6-8, c. p. 213, I-56125 Pisa. Dir. resp. Aldo de Giorgi. Stampa: Tip. Martinelli (LU) — Sped. abb. post. gr. III/70% — Cont. Inserto Pubbl. — Tassa Riscossa — Taxe Percue — N° 16 — 18 dicembre 1989 — Abonantoj en 70 landoj — Baza Jarabono: 19 US \$

DE ESPERANTO

La plej ofta sendependa internacia gazeto de la Esperanto-movado, "Heroldo de Esperanto", en la nuna jaro festas sian 70-jaran datrevenon.

"Heroldo" estis fondita la 14an de aprilo 1920 en Horrem/Kolonjo (Germanio) de Teo Jung, kaj aperadis ĝis nun kun du solaj esceptoj: en 1936, pro naziaj persekutoj, ĝi mallonge silentis ĝis sia reapero en Nederlando; la dua, pli longa, silentado okazis dum la milita periodo, inter 1940 kaj 1946.

Sub la redaktado de Ada Fighiera-Sikorska "Heroldo de Esperanto" unue aperis dum 17 jaroj en Bruselo (Belgio) kaj dum 9 jaroj en Madrido (Hispanio); ekde 1988, la ga-

zeto definitive aperas en Torino (Italio).

La ĉefaj karakterizoj de tiu-ĉi plej populara internacia Esperanto-gazeto estas:

- ĝia granda formato, simila al tag-gazeto, kaj la vario de ĝia enpaĝigo.

- ĝia ofteco (16 numeroj jare)

- la abundeco de ĝiaj informoj, verkitaj en sinteza stilo kaj prezentitaj en multaj rubrikaj pri junularo, kongresoj, feriaj renkontiĝoj, libro-recenzoj, jubileo, mal-

longaj informoj, Nia Filmo, anoncetoj, ktp

- la specialaj numeroj pri la Universalaj Kongresoj kaj la kalendaro de la Esperantaj kunvenoj kaj renkontiĝoj.

- ĝia sendependeco.

Senkomente:

FEDERICO MAYOR PRI LINGVOJ KAJ KULTUROJ

(Citaĵoj el Intervjuo kun la ĝenerala direktoro de Unesko, aperinta en The Unesco Courier, Novembro, 1989, pp.4-9).



„Mi estas kataluno; mi profunde amas mian patrujon kaj la lingvon en kiu mi ĉiam alparolis miajn gepatroj. Ĉi tiu kulturo, la frukto de pluraj civilizacioj difinas mian specialan profilon. Mi scias ke nur se mi povas evoluigi ĝin senobstake, povas mi labori por la unueco de Hispanio, por la plifortigo de ĉiuj aliaj kulturoj”.

„...la unualoka misio de Unesko estas nature, kiel esprimite en ĝia Konstitucio, 'evoluigi kaj kreskigi la rimedojn de komunikado inter ... popoloj... por la celo de reciproka kompreno kaj pli vera kaj pli perfekta kono de la vivoj de unu alia.'...”

„Mi neniam laciĝas diri, ke ... la plej multvaloraĵoj — kaj la plej minacataj — kulturaj verkoj estas la minoritataj lingvoj, la perbusaĵaj tradicioj, la kantoj,...”

„Ĝuste kiel la libereco de artisto devas esti protektata, tiel la pluvivado de la artoj, folkloro kaj popoloj devas esti certigata. Ĉi tiuj du imperativoj iras kune.”

(Selekt. kaj trad.: O.H.)

NOTO:

Federico Mayor elektigis ĝenerala Direktoro de Unesko por sesjara periodo en 1987. Antaŭe li laboris kiel rektoro de la Universitato de Granada, prezidanto de la Hispana Societo por Biokemio, fondinto-direktoro de Madrida Centro por Molekula Biologio, ministro pri Edukado kaj Scienco de Hispanio, kaj kiel membro de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo. (El Budapeŝta Informilo 6/90)

JUNULARA ANGULO


EL PARIZO KUN SIMPATIO

Eric (1959), hotela grumo, kaj Dani, artanimitino pri teksaĵoj, eklernantino de Esperanto, gastigas en malgranda triĉambra apartamento post nepra antaŭa skriba interkonsento (skribu detale kaj frue) aktivajn vegetaranojn kaj nefumantojn. Ebleco trovi loĝejon en la hotelo je preferinda kosto.

Repago de eventualaj elspezoj. Senpaga matenmanĝo. Ebleco prepari manĝaĵojn hejme. Bonvenaj nefranclingvanoj, nefumantoj kaj vegetaranoj. Interŝanĝo de gastigo preferata.

Eric Benech kaj Dani Sottas, 159 rue Marcadet, (tel. 1.42.52.69.38), F-75018 PARIS

Juna estas tiu, kiu sentas sin tia...



INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO

03-09 de aŭgusto 1990
Szödliget, Hungario

TEJO serĉas kandidaton kiel volontulo ĉe la Centra Oficejo, kiu antaŭvideble ekdeĵorus ekde septembro 1990. Kondiĉoj por la enposteniĝo: la kandidato devas esti denaska parolanto de unu el la plej grandaj lingvoj (angla, franca) aŭ perfekte regi ĝin/ilin. Kandidato ekster Eŭropa Komunumo povas ricevi laborpermeson. Salajro: 150 ned. gld. semajne, sen impostoj senpaga loĝejo. Interesuloj anoncu sin ĉe CO de UEA, Nieuwe Binnenweg, 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM (Nederlando)



JES invitas Vin al JES'90

*Junulara Esperanta Semajno
15-22 julio 1990 Košice*

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO N-RO 4

Horizontale: 1. Aŭtomobilo. 2. D. Uragano
3. Majo. RM. Kr. 4. IV. Tablo. 5. Nigra. Ulmo
6. I. Libro. Od. 7. Sekve. Joto. 8. Tc. Elo. Lir.
9. Retro. Levi. 10. Ideoj. Poo.
Vertikale: 1. Administri. 2. Ŭ. AVI. eceD.
3. Tuj. GLK. Te. 4. Oro. Rivero. 5. MA. Tabeloj.
6. Ogra. R. O. 7. Bambuoj. LP. 8. In. LL. Oleo.
9. Lokomotivo. 10. O. R. Odori.

Inter la ĝustaj ricevataj solvoj, la
gajninto fariĝis Dani Rubió el Sabadell
Gratulon!


ESPERANTO-ARANĜO en urbo VRACA
(Bulgario)

De la 19a ĝis la 21a de oktobro 1990
okazos Internacia Sciencia Esperanto-
seminario "Kosmo.Homo.Lingvo".

Adreso por informoj kaj aliĝo:
ESPERANTO. p.k.66 ,BG-3000 VRACA
(Bulgario)

(Ĉiu aliĝinto ricevos detalajn informon
kaj invitilon, bezonatan por bulgara
vizo)

KRUCVORTENIGMO N-RO 5 de Pedro M. Martin i Burutxaga



DEK TRI LANDOJ

HORIZONTALALE:

1. EŬROPA LANDO (12)
2. (inverse) Nikelo (2). Molibdeno (2). Germana "jes" (2). Pasiva sufikso (2)
3. AZIA LANDO (6). Konformaj al la ĝenerala modelo (5)
4. Unu (1). Plena manko de ordo (7). Lutecio (2)
5. Numeralo (2). Oksigeno (1). Substanco kun forta brilo kaj malmoleco uzata en arta meblofarado (4). Verba sufikso (2)
6. Du vokaloj egalaj (2). Alia vokalo (1). Natrio (2). Zoologia ĝardeno (3)
7. AFRIKA LANDO (10). Konsonanto (1)
8. Argono (1). Senso, per kiu ni perceptas sonojn (6). Longa stang' el metalo (3)
9. EŬROPA LANDO (7). Rilata al iuj grandaj birdoj kun akra vido (4)
10. Vokalo (1). (inverse) Ĉeso de ago

(4). (inverse) Eŭropa ĉefurbo (5)

11. Subjunkcio (2). Du konsonantoj malsamaj (2). Pene sin levi sur vertikala surfaco (6)

12. Grasa likvaĵo (4). Esperantista asocio (3). La plej alta karto (3)

VERTIKALE:

1. AZIA LANDO (5). AFRIKA LANDO (6)
2. Interne (3). Nia asocio (3). Uranio (1). Preposicio (2)
3. Malofta konsonanto (1). Aŭtomobila simbolo: Panamo (2). Vorto, kiu povus signifi "bonan amon" el medicina vidpunkto (5). Vokalo (1)
4. ARABA LANDO (5). AFRIKA LANDO (6)
5. Unika (4). (inverse) AZIA LANDO (6)
6. Kvindek (1). Stofa rand' (3). (inverse) Aŭtomobila firmao (4). Sulfuro (1)
7. Sufikso (2). AMERIKA LANDO (6). (inverse) Argentio (2)
8. EŬROPA LANDO (8). (inverse) En pli ol simpla kvanto (3).
9. Aŭtomobila simbolo: Aŭstrio (1). Tri vokaloj (3). Unu (1). (inverse) Rilata al virinoj (3)
10. Supra part' de la korpo (3). Kiu multe zorgas (7)
11. EŬROPA LANDO (6). Neperfekta oval' (5)
12. Vokalo (1). EŬROPA LANDO (10)